# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 3 Marto, 2014



*Kara Leganto, rapidege forflugis nur unu monato post nia interesa kunveno, kiam mi devis respondi al multaj demandoj de niaj karaj gesamideanoj pri la interna stato en Ukrainio, sed de tiam mia kara lando estis atakita fare de la "frateca" Moskovio (mi speciale ne skribis "Rusujo", ĉar tiu landnomo estis forŝtelita de t.n. rusoj de mia Rusjo-Ukrainio). Pardonu min, sed…*

*Dum la lasta renkonto ni atendis elpaŝon de s-ino Tina, sed ŝi ne venis pro iaj okazaĵoj, sendinte al la redakcio la tekston de la prelego (vd sube).*

*La sekvanta kunsido denove estos dediĉata al Ukrainio, al 200-jara datreveno de la plej fama ukraina poeto, pentristo Taraso Ŝevĉenko kaj okazos laŭ la adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago, IL. Bonvenon!*

–La Redakcio

## Gaja Vojaĝo al Norda Karolino



Mia delong-tempa Esperanta amiko ofertis al mi vojaĝon al Norda Karolino, kie lia frato Petro loĝas kun la hundo Kosmo, aŭ al Kalifornio, kie li nun laboras, aŭ al Flavstona Nacia parko. Mi malamas la vintron tie ĉi (en Ŝikagio – la red.), pro tio mi flugis al Aŝvilo (Asheville), NK, kaj daŭrigis kun ili multajn tagojn antaŭ la unua vojaĝo al Jakyll-insulo en Georgio. Mi preskaŭ forveturis hejmen pro la malbona vetero. Sed post tio ni decidis iri suden kaj havis ege bonan tempon sur Jekyll-insula ŝtata parko. Ni promenis marborde kaj mi ege ĝuis la lokon, kie oni helpas al testudojn. Manĝaĵo estis bona, ni lernis historian de la insulo ktp.

Poste ni iris norden laŭ la spuroj de la mala ŝtormo. La plej malbona vespero estis, kiam ni ne povis dum kelkaj horoj akiri lokon por noktumado. Finfine, en la ĉefurbo de Suda Karolino, Kolumbio, ni trovis lokon (forestis elektreco, pro tio ni iris al la apuda motelo). Estis terure vidi la malsanajn arbojn… Poste ni mendis iun ĉinan manĝaĵojn, kiu ne estis kunportita dum du horoj. Erare, oni kunportis ĝin al alia adreso, pro tio ni vespermanĝis je la 11 ptm.

Do, mi devis resti tie dum pli da tagoj pro tio, ke multaj flugitineroj estis nuligitaj por tri tagoj!

Do, mi ĝuis la tempon, vizitinte historian urbon Savannah (Georgio), kaj poste denove forflugis al Aŝvilon, kiu pli plaĉis al mi.

Mi revenis al vintra vetero de Ŝikagio kaj eksentis foreston de miaj amikoj: Riĉjo, Petro kaj Kosmo. *–Tina Seastrom*

## Moskovio Okupadas Ukrainion



Kion oni povas diri – nur honton. Honton al idioto putino *jes, minuskle, sen pardonpeto*, honton al 200 fifamaj aktoroj, muzikistoj, (mal)kulturagantoj. Kiam vi, finfine, kvietiĝos? Ĉu mankas al vi kun via imperiestro putino vastajn siberiajn teritoriojn (baldaŭ ĉinoj okupos ilin), strion de neagnoskata Trans-Dnistrio (kiu baldaŭ eniros Ukrainion), landojn de la monde neagnoskataj Suda Osetio kaj Abĥazio? Kion vi volas, kiam, finfine vi sattrinkos la sangon de libera homoj? Mi persone malbenos la tutan moskovian loĝantaron (80%), kape kun la plena idioto putino kaj deziras al ili trovi sin en la Infero, kun la tuta idaro kaj neparo. Estu vi malbenataj de la tuta mondo! Poreterne! Nur "ĝuu" kanton de *Andreo Panĉiŝin*. *–Araneo*

# Sangon Trinkis Kanajloj

*Tradukis Kris Long*

**Sangon trinkis kanajloj,
frande fumis kanabon.
Hundoj pretas batali
kaj mortigis jam knabon.
Sensangigis vizaĝojn,
mordminacoj retiklas:
devas hundoj sovaĝaj
ukrainojn mortigi.
Nun – infer' rabia.
Hieraŭ – nur bagatel'.
Hundoj sangebrias
kaj post ebrio – bordel'.
Hundoj manĝis viandon,
sange ruĝas l' okuloj,
kaj atendas komandon
murdi plu samlokulojn.
Nekristanaj banditoj
sturmis l' urbon feroce.
Ĉu frenezaj hundinoj
niajn ostojn forronĝos?
Nun...
Lasta guto – plej peza.
Sango limon transpasis.
Fihundaron frenezan
ni komencas forĉasi.
Nun…**

# Utilaj Informoj

La ĉiujara landa kongreso de Esperanto-USA okazos la 11-14 de Julio en Sidnejo, BC, Kanado. NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) okazos ekde 29an de Junio ĝis 8an de Julio ĉe la Universitato de Viktorio, en Viktorio, BC, Kanado, antaŭ la kongreso. Estos transportado inter la universitato kaj Sidnejo. AMO-2 (Seminario pri Akivula Maturigo) okazos inter NASK kaj la Landa Kongreso la 9-10an de Julio en Sidnejo, BC, Kanado. UEA organizas seminarion laŭ la temo 'Strategio kaj praktiko de speranto-informado en Norda Ameriko' Vidu detalojn ĉe: http://esperanto-usa.org/eo *–Esperanto-USA*

# Sekvanta Kunsido

Atenton, La sekvanta kunsido denove estos dediĉata al 200-jara datreveno de la plej fama ukraina poeto, pentristo Taraso Ŝevĉenko kaj okazos laŭ la adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago, IL 60610. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la telefonnumero (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn kaj trinkaĵon (dolĉakvon, bieron, vinon, vodkon, viskion).




## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

25an de Marto – Poezian Vesperon, dediĉita al 200-jara datreveno de la plej fama ukraina poeto Taraso Ŝevĉenko, gvidos Araneo. La kunsido okazos laŭ adreso: Cobbler Square, 1350 N. Wells St.

22an de Aprilo – Elpaŝos Gregoro Dolgin: "Rilate al tradukado": Cobbler Square, 1350 N. Wells St.

27an de Majo – temo estos anoncata

22an de Junio – Tradicia E-pikniko